



W O U K

Aŭtorino: Anna Rudawcowa

Esperantigis: Krystyna Grochocka

Tiu ĉi jare la vintro estis tre severa. Frostegoj komenciĝis de Kristnasko kaj ŝajnas resti sen fino. Ĝi enblovis grandegajn tumulojn de neĝo, inter kiuj tute kaŝiĝis pajlaj tegmentoj de vilaĝanaj domoj. Nokte lupoj alvenis en vilaĝon preskaŭ ĝis la kabanoj, vekante loĝantojn per teruriga hurlo. Kaj en sekvonta tago tiu kaj alia mastro ne povis trovi porkidon aŭ ŝafon. Iun vesperon la sovaĝaj bestoj postkuris vilaĝestron revenantan per sledo el urbeto.

Li apenaŭ kapablis fuĝi, ĵetinte en mezon de la bestaro flamantan faskon de pajlo. Sed li ege timis!

Kaĉjo ankaŭ timas lupojn. Al lernejo en najbara vilaĝeto estas du kilometroj, kaj oni devas iri per kampa vojo apud arbaro. Ne grava estas tio, ke pala, vintra suneto brilas! Oni scias, ke malsata lupoj en hela tago povas ĵeti sin sur elektitan kaptajon! Kaj hodiaŭ, kiam li eliris en lernejon, paĉjo diris, kvazaŭ ŝerce: "hladzi Kaziuk, kab ciebia pa darozie wouk nie uchapiu! (Atentu, ke dumvoje lupoj ne kaptu vin!).

Tial Kaĉjo vadas preskaŭ ĝis la zono, en neĝamaso kaj maltrankvile ĉirkaŭrigardas. Varmege estas al li pro timo kaj peno, malgraŭ ke li havas mizeran vestaĵon: flikitan kaftanon de patrino, kaj sur la piedoj –

grandegajn feltajn ŝuojn de patro, en kiuj li aspektas kiel kato en ŝuoj.
- Ankoraŭ iomete, jam mi estas proksimete! –li aldonas al si kuraĝon,
kiam li ekvidis la unuajn malproksimajn kabanojn. Sed kio estas tio? Trans
kampo, rekte al la knabo galopas iu granda hara estaĵo kun eltirita
lango.

Wouk! (Lupo!) – timigita knabeto kriegis per nepropa voĉo kaj provis
fuĝi. Sed li senmoviĝis en longa patrina kaftano kaj falis sur malvarman
neĝon. Post momento li ekaŭdis super sia kapo spiregon de terura lupo
kaj sentis ĝian varmegan spiron. – Nun ĝi manĝos min, li ekpensis kun
malespero kunpremante palpebrojn.

Sed la lupo eble ne havis malbonajn intencojn. Ĝi nur flaris la kuŝantan
knabon, kaj poste ĝoje ekhurletis kaj per vasta lango tuŝis lian blankan
pro timo vizaĝeton. – Kia straga lupo! – pensis Kaĉjo kaj sigarde
malfermis unun okulon. Ja tio estas Zagraj! - amata Zagraj! - li kriis
subite kaj staris sur teron. Jes, dubo ne estis. Luphundo Zagraj, la hundo
de sinjorino instruistino kaj ĝenerala favorato de ĉiuj lernejoj, saltis
antaŭ la knabo kaj grimpis sur malantaŭaj piedoj.

- Zagraj amata, honesta hundego! - ĝojis Kaĉjo, premante al si kapon de
supozebla lupo.

Kaj Zagraj rigardis la knabon tiom saĝe, kvazaŭ komprenus ĉion kaj ĝoje
vostumis.